

UC-NRLF



B 4 798 342

PM
8213
G35
1906

LIBRARY
UNIVERSITY OF
CALIFORNIA,
SANTA CRUZ

SANTA CRUZ



Gift of
MRS. JOHN CLIFFORD

UNIVERSITY OF CALIFORNIA



.. THE UNIVERSITY LIBRARY ..



SANTA CRUZ



John M. Clifford Jr.

KURSO TUTMONDA DE LA LINGVO INTERNACIA ESPERANTO LAŬ LA METODO NATURA

VERKIS

EMILO GASSE

Profesoro aprobita de S. F. P. P. E.

DUA ELDONO REVIDITA

FRANCUJO. — HACHETTE et C^{ie}, PARIS.

ANGLUJO. — « REVIEW of REVIEWS », LONDON.
DANUJO. — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, KJOBENHAVN.

GERMANUJO. — MÖLLER & BOREL, BERLIN.

HISPAÑUJO. — J. ESPASA, BARCELONA.

ITALUJO. — RAFFAELLO GIUSTI, LIVORNO.

POLUJO. — M. ARCT, WARSZAWA.

SVEDUJO. — ESPERANTOFÖRENING, STOCKHOLM.

KOLEKTO ESPERANTA APROBITA DE D^o ZAMENHOF

FRANCUJO. — HACHETTE kaj K^o, 79, Boul. St-Germain, Paris

VERKOJ DE D^o ZAMENHOF

ĈIU ESPERANTISTO DEVAS ILIN POSEDI

Fundamento de Esperanto (bindita).	3	»
— (brošurita).	2	»
Oni vendas aparte : { Ekzercaro	»	75
Universalas Vortaro	1	»
Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto.	3	50
Hamleto, tradukita el Shakespeare, nova eldono.	2	»

LIVRES D'ÉTUDE POUR FRANÇAIS

Grammaire et Exercices de la langue Esperanto, par L. de Beaufront.	1	50
Corrigé du précédent, par L. de Beaufront.	»	75
Commentaire sur la grammaire Esperanto, par L. de Beaufront	2	»
Texte synthétique, par L. de Beaufront.	»	50
Thèmes d'application, Lexicologie, Syntaxe, Formation des mots de l'Esperanto, vocabulaire des mots employés, par L. de Beaufront.	2	»
Cours commercial d'Esperanto, par L. Marissiaux.	1	50
Corrigé du précédent, par L. Marissiaux.	1	»
L'Esperanto en dix leçons, par Th. Cart et Pagnier.	»	75
Corrigé du précédent, par Th. Cart et M. Procureur.	»	50
Premières leçons d'Esperanto, par Th. Cart.	»	30
Dictionnaire Esperanto-Français, par L. de Beaufront.	1	50
Structure du dictionnaire Esperanto, par L. de Beaufront.	»	30
Vocabulaire Français-Esperanto et Vocabulaire abrégé Esperanto-Français, par Th. Cart, M. Merckens et P. Berthelot	2	50
Vocabulaire des mots spéciaux à la philatélie, par R. Lemaire.	»	40

TEKSTOJ EN ESPERANTO

Brueys et Palaprat. <i>Advokato Patelin</i> , tradukita de J. Evrot.	75	»
Devjatnin. <i>Verkaro</i>	2	»
Diversajoj, rakontetoj tradukitaj de Ŝoj Lallemand kaj Beau.	1	25
Ekzercoj de <i>Aplikado</i> , de L. de Beaufront.	1	»
Esperantaj prozajoj, de diversaj aŭtoroj.	2	50
— (1 ^a Parto), <i>Rakontoj kaj Fabloj</i>	»	25
Godineau. <i>La Kolorigisto-aeravturo</i>	»	30
Komercaj letero ^j , de P. Berthelot kaj Ch. Lambert.	»	50
Kondukanto de <i>l'Interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio Internacia</i> , de Grabowski.	2	»
Kurso tutmonda, de E. Gasse.	»	75
Labiche et Legouvé. <i>Cikado ĉe Formikoj</i> , unuakta komedio.	»	60
La Fontaine. <i>Elektitaj Fabloj</i> , esperantigitaj de G. Vaillant.	»	75
La Komerca sekretario, de Ros Sudria.	»	50
Leibniz. <i>Monadologio</i> , tradukita de Emile Boirac.	»	60
Maistre (X. de). <i>Voyaĝo interne de mia Cambro</i> , trad. de S. Meyer.	»	75
Matematika terminaro kaj krestomatio, de R. Bricard.	»	75
Molière. <i>L'Avarulo</i> , tradukita de S. Meyer	»	75
— <i>Don Juan</i> , tradukis E. Boirac.	1	50
Norman. <i>Poslibro Interna</i> , por Aferistoj, Turistoj, K. C.	2	»
Orzesko. <i>La interrompita kanto</i> , tradukita de Kabe.	»	75
Perrault (Ch.). <i>Rakontoj pri Feinoj</i> , tradukitaj de Sinjorino Sarpy.	1	»
Pola Antologio, elektis et tradukis Kabe.	2	»
Sieroševski (Vaclav). <i>La Fundo de l'mizerio</i> , tradukita de Kabe.	»	75
Virgilio. <i>Eneido</i> , kantoj I-XII, tradukita de Dr ^e Vallienne.	3	»

(Turnu.)



LIBREJO HACHETTE KAJ K^o, PARIS

Tutmonda Jarlibro Esperantista 1906

EN HAVANTA LA
Adresaron de D^o ZAMENHOF

LA REVUE

Internacia monata literatura gazeto

Redaktata kun la konstanta kunlaborado de

D^ro. L. L. ZAMENHOF

kaj de eminentaj Esperantistoj de ĉiuj landoj.

Ĝi estas pure literatura kaj enhavas: novelojn, poeziojn, komediojn, dranojn, seriozajn studiojn pri historio, geografio, statistiko; popolmorojn k. c., kronikon kaj bibliografion.

La 1^a numero aperis la 1^{ma} de septembro 1906. Okaze de la 2^a Kongreso Internacia de Esperanto.

JARA ABONO

Francujo, 6 fr. + Ceteraj landoj, 7 fr.

UNU NUMERO : 50 centimoj

Internacia Scienca Revuo

Monata sciencia revuo redaktita

EN ESPERANTO

Eldonata de la 1^a de Januaro 1904

REDAKCIÓ :

P. FRUITIER
27, *boulevard Arago.*
PARIS

ADMINISTRACIÓ :

HACHETTE & K°
79, boulevard Saint-Germain,
PARIS

JARA ABONO

Francujo. 6 fr. 50 | Ceteraj landoj. 7 fr.

UNU NUMERO : 60 centimoj

BILDAROJ

Teksto en Esperanto — 25 malsamaj numeroj

Prezo : la Serio. 2 fr. 50
 " " *per posta simpla* 2 fr. 65

540-06. — Coulommiers. Imp. PAUL BRODARD. — P9-06.

KURSO TUTMONDA

DE LA LINGVO INTERNACIA

ESPERANTO

LAŬ LA METODO NATURA

VERKIS

EMILO GASSE

Profesoro approbita de S. F. P. P. E.

DUA ELDONO REVIDITA

PARIS

LIBRAIRIE HACHETTE ET C^{ie}

79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, 79

—
1906

Tous droits réservés.

PM
8213
G35
ANTAŪPAROLO
1906

La ĝisnuna instruado de la lingvo Esperanto, tiel same kiel la instruado de la fremdaj lingvoj, estis videble nesufiĉe kontentiga.

La malbono kuſas en la metodo uzata, kiu devigas la lernanton lerni per tradukoj, kiuj sorprenas almenaŭ la duonon de la tempo oferata, kaj kiuj emigas la lernanton enmeti en la lingvon la nelogikajn — tiel multajn, ho ve! — formojn de niaj lingvoj naciaj. Tio plie malbone jugigas pri la facila lernebleco de nia lingvo, kiu tamen estas la simpleco mem.

Ekzemplo de la malboneco de tiu metodo ne natura estas al ni liverata de la fremdaj lingvoj : vojaĝistoj tre rapide lernas senpene sufiĉe por daŭrigi interparoladon en la lingvoj de la landoj, kiujn ili trapasas, dume lernantoj pasigintaj multe da jaroj super libroj, estas neniel kapablaj ian ajn interparoladon daŭrigi.

Plie, kiam infanoj, ĉu francaj, ĉu finaj, eklernas sian lingvon gepatran, ili ne lernas unue la gramatikon; la vortoj estas lernataj de ili laŭbezone kaj laŭgrade; kiam ili eklernas la gramatikon, ili jam

estas kapablaj interparoladi kaj alkutimigis pli aŭ malpli al la formoj de la lingvo. Tiel ili preskaŭ senpene lernas lingvojn iafoge eksterordinare malsimplajn.

Ni uzu do la metodon liveratan al ni de la Naturo, alfarante ĝin al Esperanto.

Tiel la lernantoj kutimos pensi en la lingvo lernata kaj ili ne tradukos blinde; ĉe ĉiu momento, la nelogikajn formojn de sia lingvo. La progresoj estos pli rapidaj, la lernado estos nur ludo, kaj tuj kiam ili interparolos kun alilandaj samideanoj, ili ne mala-grabligos la uzadon de la lingvo per nelerta kaj malbela esprimado.

Oni ja ne forgesu ke nun E. estas antaŭ ĉio la lingvo de la Turistoj, kaj ke ĝi devas esti, antaŭ ĉio, parolata.

Unu el la ĉefaj utiloj de ĉi tiu « Kurso Tutmonda » estos ebligi la instruadon de la lingvo al ĉiuj popoloj de la mondo, kiujn ajn lingvojn ili havas, dumne alie ili devus ankoraŭ atendi multajn jarojn por ricevi tradukitajn lernolibrojn laŭ la malnova metodo. Kaj tiu utilo estos ankoraŭ pli sentebla kiam ni havos nuresperantajn vortarojn.

Mi rekomendas ĝin ankaŭ al la misiistaroj koloniaj, kiuj tiel malfacile povas igi la necivilizitajn popolojn lerni niajn malsimplajn lingvojn. Tiuokaze, niaj francaj samideanoj eble rememoros la diraĵon de generalo Faidherbe : « La verbo estas la ĉefa malhelpo por la franca koloniigado ! »

Per tiu metodo mi ja enkondukas nenion novan,

ĉar ĝi jam estas uzata de kelkaj jaroj por la ins-truado de la fremdaj lingvoj, kun videbla sukceso.

Mi do petas de ĉiuj samideanoj senpartian provon de ĉi tiu metodo kaj kuraĝas esperi ke ĝi potence helpos al la bonsfamo kaj disakceptigado de nia kara lingvo.

EMILO GASSE

Havro, Aŭgusto 1904.

UNUA PARTO

GRAMATIKO

KONSILOJ AL LA INSTRUANTOJ

1. Antaŭ ol doni lecionon, la instruanto devos perfekte scii ne nur la enhavon de tiu leciono, sed ankaŭ la enhavon de la antaŭaj. Nur se li konas bone la vortaretojn lernitajn, li povas esti certa uzi nur vortojn konatajn de la lernanto, ĉe siaj komprenigoj; kaj provi komprenigi novan esprimon per aliaj ankaŭ novaj estus, kompreneble, sensencajo.

2. La ekzemploj de la libro devas esti ŝangataj laŭ la cirkonstancoj kaj ĉirkaŭaĵoj; kaj ĉar la progresado de la lernanto estas proporcia kun la sumo de ekzercado, kiun li ricevis, la instruanto devos tre multigi la ekzemplojn — tre zorgante, tamen, ne doni ion malfacilan, sed simple imitante la esprimojn liveritajn de la libro.

3. Ĉiuj novaj vortoj kaj esprimoj estos skribitaj sur la nigran tabulon, sed nur kiam ili estos iom praktikitaj. La lernanto devos unue lerni per la orelo, por akiri bonan elparoladon. Se la lernanto lernus la vortojn skribite antaŭ ol parolite, li nekonscie donus al la literoj la elparoladon de sia propra lingvo; tiuokaze oni rememoru, ke estas pli facile preni malbonan kutimon ol ĝin forlasi.

La instruanto devos zorgi paroli nature kaj donante al ĉiu silabo la valoron, kiun ĝi devas havi en la tiama frazo kaj tiusence korekti la erarajn elparolojn. La francaj instruantoj ĉefe zorgos pri la acento, tiel ke ilia lingvo povas erarigi ilin pri tio. Oni ne forgesu, ke tamen la finiĝoj devas esti elparolataj.

4. Se la lernanto ŝanceligas respondi, la instruanto devas tuj lin helpi kaj, se necese, skribi la respondon sur la nigra tabulo. Post tio, la sama demando estos ripetata, por kontroli ĉu la lernanto povas tiam respondi. Temoj, kiuj ŝajnas malfacilaj por la lernanto ne estos donataj trolonge ĝis lacigo, sed la instruanto devos ofte reveni al tiuj temoj, ĝis ili estos venkitaj.

5. Kiam li korektos eraron, la instruanto nur elparolos la ĝustan esprimon, ne citante la eraron. Ripetante la eraron, li kutimigus la orelon de la lernanto al la sono erara, dume, male, li devas esti kutimigata al la ĝusta formo. Ĉi tiu lasta estos ripetata kelkfoje por forigi ian ajn rememoron pri la eraro.

6. Estas preferinde ne permesi al la lernanto antaŭlabori lecionojn pro la elparolado, almenaŭ pri la unuaj lecionoj.

7. La vortoj estas komprenitaj per agoj aŭ montroj; *a)* por komprenigi : sidiĝi, sidi, starigi, legi, paroli, ktp, la instruanto sidiĝu, sidu, starigi, legu, parolu, nomante samtempe la agon kaj ĝin ripetigante de la lernanto, kun la postdemando : Kion vi faras? *b)* por komprenigi : libron, seĝon, tablon, fenestron, paperon, la instruanto montru

libron, segon, tablon, kc., ilin nomante samtempe.

Nur ajoj nemontreblaj aŭ ne praktike montreblaj, kiel pomo, pano, telero, domo, ŝuparo, korto, kampo, aŭ agoj kiel ridi, plori, danci, krii, estos nacien tradukitaj. Sed, mi ripetas, se la instruanto jugas, ke li devas agi kiel por infano, li ĉiam povos komprenigi nur per la lingvo mem, kaj tiel li, nerimarkite de la lernanto, kutimigos la orelon de ĉi tiu por aŭdi sufie longajn frazojn de la lingvo lernata. Kompreneble, tiuj komprenigoj estas ĉiam donotaj tre malrapide kaj klare.

(Legu la postparolon pri la ekzemplaj komprenigoj.)

GRAMATIKO

UNUA LECIONO

Mi fermas la pordon.
mi malfermas la pordon.
mi fermas la libron.
mi malfermas la libron.

Kion *mi* faras? kc. Fermu la pordon! Kion *vi* faras?
Malfermu *gin*! Kion *vi* faras? Malfermu la libron!
Kion kc. Fermu *gin*! Kion kc. (kaj cetere).

Kien mi iras? al la fenestro mi iras. Kien mi iras?
Al la pordo mi iras. Kien mi iras? Al mia sego mi iras.

Iru al la fenestro! Kien *vi* iras? kc.

Mi staras. Mi sidigas sur la segon. Kien mi sidigas?
Mi sidas sur la sego. *Kie* mi sidas? Mi starigas de la
sego. *De kie* mi starigas? Mi staras.

Sidiĝu sur la segon. Kion *vi* faras? Kien *vi* sidiĝas?
Stariĝu de la sego! Kion *vi* faras? *De kie* *vi* starigas?

Iru al la pordo! *De kie* *vi* venas? *Vi* venas de la
sego, Kien *vi* iras, kc.

Mi prenas la libron. Kion *mi* prenas? Prenu la
libron! Kion *vi* faras. Mi prenas la libron de *vi*. Kion
mi faras? Kion *mi* prenas de *vi*? La libron mi prenas
de *vi*. Mi metas la libron sur la tablon. Kion *mi* faras?
Kion *mi* metas sur la tablon? Kien *mi* metas la
libron? Mi donas al *vi* la libron. Kion *mi* faras?
Donu al *mi* la libron! Kion *vi* faras? Kion *vi* donas
al *mi*?

DUA LECIONO

Mi (la instruanto) sidiĝas. *Kiu* sidiĝas? : Vi sidiĝas (aŭ la instruanto sidiĝas). Vi (la lernanto) sidas. *Kiu* sidas? Ĉu la instruanto staras? Ne, Sinjoro, li ne staras, sed sidas. Ĉu la lernanto sidas? Jes, Sinjoro, li sidas. *Kiu* sidas? *Kiu* staras. Stariĝu! *Kiu* starigas? Mi sidiĝas : *kiu* sidiĝas?

Ĉu Sinjoro Aŭgusto sidas? Jes, li sidas. Ĉu Sinjorino Paŭlino starigas? Ne, Sinjoro, *si* ne starigas, sed sidas. Ĉu la sego staras? Jes, Sinjoro, *gi* staras. Ĉu la libro kušas? Jes, Sinjoro *gi* kušas.

Sinjoro Ludoviko, stariĝu! Ĉu vi kaj mi staras? Jes, *ni* staras. Ĉu la lernanto kaj la instruanto staras? Jes, *ili* staras. Sidiĝu *ni*! Kion *ni* faras?

Ĉu vi staras aŭ sidas? Mi ne staras, sed sidas.

Ĉu vi starigas aŭ sidiĝas? Mi nek starigas, nek sidiĝas, sed sidas.

Iru al la fenestro! Ĉu vi iras al la pordo? Iru al la nigra tabulo! Ĉu vi iras al la fenestro aŭ al la pordo?

Pronomoj personaj kaj tempo estanta :

Mi staras, sidas, iras, sidiĝas, kc.

vi	—	—	—	—
li	—	—	—	—
si	—	—	—	—
gi	—	—	—	—
oni	—	—	—	—
ni	—	—	—	—
vi	—	—	—	—
ili	—	—	—	—

TRIA LECIONO

La plafono; la muro; la pordo; la fenestro; la tablo; la sego; la nigra tabulo; la planko.

Ĉu, tio estas la plafono, la muro, la pordo, k. c.

Jes, tio estas la plafono, k. c. Kio estas la plafono? k. c.

Ĉu ĉi tio estas la sego, la tablo, la tabulo, k. c.? Jes, Sinjoro, ĉi tio estas la sego, k. c.

Kie estas la plafono? La plafono estas tie.

Kie estas la sego? La sego estas ĉi tie, k. c.

Mi montras al vi la plafonon. Kion mi faras? Montru al mi la pordon, k. c.! kion vi faras? Tuŝu la muron, k. c.! kion vi faras?

Mi staras apud la pordo, la fenestro, la muro, la tablo, k. c. Apud kio mi staras? Kie mi staras? kie vi staras. Mi staras inter la tablo kaj la tabulo.

La libro kuſas sur la tablo, sub la tablo, super la tablo. Mi staras antaŭ la nigra tabulo, malantaŭ (aŭ post).

Mi staras dekstre de la tabulo, maldekstre.

Mi kuſigas la libron sur la tablon. Kuſigu la libron sur la tablon, sub la tablon. Iru al la fenestro, al la pordo.

Kial vi iras al la fenestro? Tial ke (aŭ ĉar) mi ordonas al vi iri al la fenestro, k. c.

Mi staras inter la tabulo kaj la tablo. Kie mi staras?

Mi iras al la tabulo. Mi venas de la tabulo; de kie mi venas?

Mi staras antaŭ la tabulo; mi staras kontraŭ ĝi.
 Staru antaŭ la tabulo? kontraŭ? Kie vi staras? Mi
 staras post (aŭ malantaŭ) la tabulo.

La libro kuſas (ne movo) sur super
sub } la tablo¹.
 Mi metas (movo) la libron sur super
sub } la tablon.

Mi staras en la ĉambro. Kie mi staras? — Mi en-
 iras en la ĉambron. Kien mi eniras? — Eliru el
 la ĉambro. De kie vi eliris? — Eniru en la ĉam-
 bron. Kien vi eniris? — Ĉu vi eniris en la ĉam-
 bron? kc.

Mi prenas mian ĉapelon. Kion mi prenas? — Mi
 metas ĝin sur mian kapon. Kien mi ĝin metas? kc.

La libro estas en la tirkesto, poſo, k. t. p. Mi
 prenas la libron el la tirkesto, poſo, k. t. p. Mi
 metas la libron en la tirkeston.

La plafono estas super la planko. Kie estas la
 plafono? Malsupre de la muro, estas la planko. Kie
 estas la planko?

Ni sidas sub la plafono, kaj la plafono estas super
 ni. Kie ni sidas; kie estas la plafono?

Ĉu io kuſas sur la tablo? Jes, unu libro. Ĉu nun
 kuſas io sur la tablo? Ne, nenio.

1. Diru nacie, ke kiam prepozicio ne suficiĝas montras movon, oni pleni-
 gas la sencon per akuzativo; samtempe douu ekzemplon similan al « la
 muso kuras sub la tablon kaj sur la tablo ».

KVARA LECIONO¹

Ĉi tiu paperfolio estas blanka, nigra, rozkolora, verda, flava, ruĝa, blua, griza, multkolora.

Kiel kolora estas ĉi tiu paperfolio? Ĉi tiu paperfolio estas blanka, rozkolora, nigra, k. c.

Kiel kolora estas la signo esperantista?

Ĉi tiu paperfolio estas Kio estas blanka?
blanka.

Mi prenas la blankan pa- Kion mi prenas?
perfolian.

Prenu la blankan, ruĝan, verdan, k. c. paperfo-
lion.

La blanka paperfolio estas longa, la nigra estas
mallonga.

La blanka paperfolio estas larga, la nigra mal-
larga.

La blanka paperfolio estas granda, la nigra mal-
granda.

La libro estas dika, kaj la kajero estas maldika.

La nigra tabulo estas alta, la seĝo estas malalta.

Kio estas longa, mallonga, k. c.?

Kiu paperfolio estas longa, mallonga, k. c. la
blanka, la nigra?

La flava libro estas pli dika ol la verda.

La blanka paperfolio estas pli longa ol la nigra.

1. Por praktike montri la kolorojn kaj grandecojn la instruanto havigu al si diverskolorajn paperfoliojn kaj tranĉu ilin laŭ nesamaj grandeoj kaj tiel li montru ilin kun la necesaj klarigoj al la lernanto.

La verda paperfolio estas pli larĝa ol la griza.

La nigra paperfolio estas malpli longa ol la blanka.

La griza paperfolio estas malpli larĝa ol la verda.

Pli granda ol.

Malpli granda ol.

La rozkolora folio estas tiel granda kiel la griza.

La flava folio estas tiel longa kiel la ruĝa.

El la ruĝa kaj la blanka folioj, la blanka estas la pli granda.

El la griza, flava kaj multkolora paperfolioj, la plej granda estas la multkolora.

La pli granda el.

La malpli granda el.

La plej granda el.

La malplej granda el.

Jen estas tri paperfolioj; kiu estas la plej granda, la plej larĝa, la ruĝa, la verda, la blanka?

Mi tuſas la gaslampon. Ĉu vi povas tuſi la plafonon? Ne. Kial? Tial ke (aŭ ĉar) vi ne estas sufice altkreska.

Ĉu vi estas sufice altkreska por tuſi la supron de la pordo? de la muro? de la nigra tabulo? Ĉu vi povas tuſi la gaslampon, kiam vi sidas sur la ŝego?

Ĉu iu staras antaŭ la tabulo? Jes! kiu? La instruanto. Ĉu nun staras iu antaŭ la tabulo? Ne, neniu. Ĉu iu sidas sur ĉi tiu ŝego? Ne, neniu.

KVINA LECIONO

0 nulo.	10 dek.	20 dudek.
1 unu.	11 — unu.	21 dudek-unu.
2 du.	12 — du.	23 dudek-tri.
3 tri.	13 — tri.	30 tridek.
4 kvar.	14 — kvar.	41 kvardek-unu
5 kvin.	15 — kvin.	53 kvindek-tri.
6 ses.	16 — ses.	65 sesdek-kvin
7 sep.	17 — sep.	77 sepdek-sep.
8 ok.	18 — ok.	88 okdek-ok.
9 naŭ.	19 — naŭ,	99 naŭdek-naŭ.
100 cent.		1 metro.
200 ducent.		40 metroj (aŭ dekame-
333 tricent-tridek-		tro).
tri.		100 metroj (aŭ hektome-
479 kvarcent-sep-		tro).
dek-naŭ.	1.000	metroj (aŭ kilome-
856 okcent-kvin-		tro).
dek-ses.	10.000	metroj (aŭ miriame-
4.000 mil.		tro).
2.000 dumil.		40 litroj (aŭ dekalitro).
100.000 centmil.		100 litroj (aŭ hektolitro).
1.000.000 miliono.		
1.000.000.000 milmiliono.		

Mi kalkulas de unu ĝis 7. Kalkulu de 8 ĝis 23. Kion vi faras? Mi adicias : 3 kaj 6 faras 9. Sumigu 7 kaj 4. Kion vi faras? Kiom faras 2 kaj 4? Ĉu 3 kaj 4 faras tiom, kiom 5 kaj 2? Ĉu 3 kaj 2 faras tiom, kiom 6 kaj 2? Ne, tio faras malpli multe. Cu 11 kaj 3 faras tiom, kiom 9 kaj 2? Ne, tio faras pli multe.

Mi multiplikas : 10 foje 3 faras 30, aŭ : 10 oble

3 faras 30. La duoblo de 2 estas kvar, la trioblo de 3 estas 9. Kiom estas la dekoblo de 4? de 5? de 7? de 9? Kiom faras kvarfoje 5? Kiom estas kvinoble 6? sesoble 3?

Mi dividas : la triono de 9 estas 3, la duono de 10 estas 5. La sesono de 66 estas 11. Kiom estas la dekono de 100? la sepono de 70? Duono : $1/2$, triono : $1/3$, kvarono : $1/4$ du kvinonoj : $2/5$, du centonoj : $2/100$; dek milonoj : $10/000$. Unu litro dekvin centonoj : $1^{1,15}$; unu metro sepdek centonoj : $1^{m,70}$.

1, 2, 3, 4 estas ciferoj, 123 estas nombro.

SESA LECIONO

Mi *skribas*. Mi *skribas* la Zamenhofan A, B, C, a, b, c, ĉ, estas literoj, b, c, ĉ, d, f, g, ĝ, k. c. (kaj cetere), estas *konsonantoj*, a, e, i, o, u, ū, estas *vokaloj*. « *Tablo* » estas *vorto*. *Kiom da* literoj enhavas la vorto « *tablo?* » *Kiom da* konsonantoj, da vokaloj? *Kiuj* estas la konsonantoj de la vorto « *mašino* », la vokaloj? La vorto « *mašino* » enhavas tri *silabojn* : *ma* — *šin* — *o*. *Kiom da* silaboj enhavas la vorto « *konsonanto* »? *M-a-š-i-n-o* — *mi la*ūlitere elparolas la vorton « *mašino* ». Elparolu laūlitere la vorton « *planko* ». En la vorto « *mašino* » *m* estas la *unua litero*, *a* estas la *dua*, *š* estas la *tria*. *Unua*, *duia*, *tria*, *kvara*, *dudekduia*, *centa*, *mila*, *k. t. p.* La litero *o* estas la *lasta*, la litero *n* estas la *antaŭlasta*. Mi *elparolas* la vorton « *rapido* » el la Zamenhof'a lingvo, la vor-

ton « street » (strit) el la angla lingvo, « strasse » (Strase) el la germana. En Parizo oni *parolas france* (aŭ la *francan lingvon*). En Londono oni *parolas angle*; en Berlino, oni *parolas germane*; en Varsovio, oni *parolas pole*; en Madrido, oni *parolas hispane*; en Prago (Praha), oni *parolas boheme kaj germane*; en Buda-Pesto, oni *parolas hungare*. Paroli *france*, *angle*, *germane*, *hispane*, k. c.

Ĉu vi *parolas france?angle?germane?Kian lingvon* vi *parolas plej bone? malplej bone? Kiom da lingvoj* vi *parolas?*

La francoj *loĝas* en *Francujo*, la germanoj en *Germanujo*, la bohemoj en *Bohemujo*. Polujo, Hispanujo, Grekujo, Turkujo, Portugalujo. Kiuj *loĝas* en *Rusujo*, *Danujo*, *Norvegujo*, *Italujo*, *Persujo*, *Hungarujo*, *Anglujo?* Kiel oni *parolas* en *Germanujo?* en *Armenujo?*

Parizo, Londono, Madrido, Romo, Ateno, Berlino estas *ĉefurboj*. Havro, Lejpcigo, Hamburgo, Roterdamo, Venecio, Torino, Milano estas *urboj*.

Mi ne estas urbano, sed kamparano.

La *Parizanoj*, *loĝas* en *Parizo*. Kiel oni *nomas* la *loĝantojn* en *Londono*, *Berlino*, *Prago* (Praha), *Varsovio*, *Ateno*, *Romo*?

Ĉu vi *estas Londonano aŭ Havrano?*

Anglujo, Belgujo; Francujo, Aŭstrujo-Hungarujo, Rusujo, Germanujo, k. c., estas la *ĉefaj* (grandaj) *landoj* de Eŭropo. Persujo *estas* en *Azio*; Kanado en *Norda Ameriko*; Bolivio en *Suda Ameriko*; *Algerio* en *Afriko*; *Borneo* *estas* en *Oceanio*. Eŭropo, Azio,

Ameriko, Oceanio kaj Afriko estas la kvin mondpartoj.

Inter Dovro (Dover) kaj Kalezo (Calais) estas *markolo*; inter Marsejo (Marseille) kaj Alĝero estas *maro*, kiun oni nomas « Meza Maro » aŭ *Mediteraneo*; inter Francujo kaj Kanado estas *oceano* (aŭ « *marego* »), kiun oni nomas « *Oceano Atlantika* » aŭ *plisiniple « Atlantiko »*. La landoj *okupas* la kvaronon de la supraĵo de la *Tero* kaj la maroj la tri kvaronojn.

Tamiso, Sejno, Elbo, Guadalkiviro estas *riveroj*. Plej grandan riveron, kiel Misisipio, Amazono, k. c., oni nomas « *riverego* »; montego, marego, landego, urbego, tablego, estas *tre grandaj monto, maro, k. c.*

Kaŭkazo estas *monto*. Karpatoj, Pireneoj, Alpoj estas *montaroj*. Pamiro estas *plataĵo*. Preūsujo estas *tre plata kaj Svisujo* estas *monteca*. La ebenajoj *karakterizas* la landojn *platajn* kaj la landoj *montecaj* estas *karakterizataj de la montoj*. *Tre malaltan monton* oni nomas « *monteto* ». *Rivereto, mareto, landeto, urbeto, tableto, k. c.*

Komo, ; punkto .; punktokomo ;; punktoduo :; signo ekkria !; signo demanda ?; strekelo -; apostofo ' ; supersigno ^ ; parentezoj (...) ; krampe-toj « ... ».

SEPA LECIONO

Mi malfermas la pordon. Mi fermas la pordon. Malfermu vian libron, kaj prenu la paĝon 23^{an}. Mi legas la unuan frazon. Mi le - gas tre mal - ra-pi-de. Mi legas rapide. Mi legas *laŭte*; mi legas *mallaŭte*. Kiu, legas mallaŭte? Legu laŭte. Legu malrapide. Kiu legas laŭte kaj malrapide¹?

Ekzercoj skribotaj.

La lernanto respondos la jenajn demandojn².

A. — 1. Kion vi fermas? — 2. Kion vi malfermas? — 3. Kien vi iras? — 4. Ĉu al la pordo vi iras? — 6. Sur kio vi sidigas? — 6. Ĉu vi starigas sur la sego? — 7. Ĉu oni sidas sur tablo? — 8. De kie vi venas? — 9. Kion vi prenas?

B. — 1. Kiu sidas? — 2. Ĉu la lernanto staras? — 3. Ĉu la instruanto sidas? — 4. Ĉu la lernanto sidigas aŭ starigas? — 5. Kiu sidas? — 6. Ĉu Sinjoro Aŭgusto staras? — 7. Ĉu la sego kušas? — 8. Ĉu la libro staras aŭ sidas? — 9. Kion faras Sinjoro Ludoviko? — 10. Ĉu vi kaj mi staras?

C. — 1. Ĉu ĝi tio estas libro? — 2. Ĉu tio estas muro? — 3. Kie estas via libro? — 4. Kie estas la muro? — 5. Apud kio vi staras? — 6. Kie vie staras. — 7. Apud kio vi sidas? — 8. Kien vi iras? — 9. Kiu iras al la pordo? — 10. Kie kušas la libro? — 11. Ĉu la libro estas sur la tablo? — 12. Ĉu vi kušigas la libron sur la tablon? — 13. Ĉu vi iras al la fenestron? — 14. Kiu staras inter la tabulo kaj la tablo? — 15. Kie vi staras? — 16. Kien vi iras? — 17. De kie vi venas? — 18. Antaŭ kio vi staras? — 19. Kontraŭ

1. La lernanto revidu la antaŭajn lecionojn!

2. La instruanto montru sur la tabulo kelkajn respondojn apud la demandoj al la lernanto. Ne postulu ĉiujn ekzercojn en unu fojo.

kio vi staras? — 20. Sur kion vi sidigas? — 21. Sur kio vi sidas? — 22. Kie estas la libro? — 23. Kion mi prenas el la tirkesto? — 24. Kion mi metas en la tirkeston? — 25. Kie estas la plafono? la planko? — 26. Kie ni sidas kaj kio estas super ni? — 27. Kiu sidas sur la sego? — 28. Ĉu io kušas sur la tablo? — 29. Ĉu ia libro kušas sur la tablo?

C. — 1. Kiel kolora estas la stelo Esperantista? — 2. Ĉu ĉi tiu paperfolio estas blanka? — 3. Kio estas blanka? — 4. Kion mi prenas? — 5. Ĉu la ruĝa paperfolio estas longa aŭ mallonga? — 6. Ĉu la blanka paperfolio estas larĝa aŭ mallarĝa? — 7. Ĉu la blanka paperfolio estas granda aŭ malgranda? — 8. Ĉu la libro estas dika aŭ mal-dika? — 9. Ĉu la nigra tabulo estas alta aŭ malalta? — 10. Kio estas malalta? — 11. Kio estas alta? — 12. Ĉu la flava libro estas pli dika ol la verda? — 13. Ĉu la blanka paperfolio estas pli longa ol la nigra? — 14. Ĉu la verda paperfolio estas pli larĝa ol la griza? — 15. Ĉu la nigra paperfolio estas malpli aŭ pli longa ol la blanka? — 16. Ĉu la rozkolora folio estas tiel granda kiel la griza? — 17. Kiu folio estas la pli granda? — 18. El la griza, flava kaj multkolora folio, kiu estas la plej granda, la malplej granda? — 19. Kion mi tušas? — 20. Ĉu vi povas tuši la plafonon? — 21. Kial? — 22. Ĉu vi estas sufice altkreska por tuši la supron de la pordo? de la muro? de la nigra tabulo? — 23. Ĉu vi povas tuši la gas-lampon kiam vi sidas sur la sego? — 24. Ĉu iu staras antaŭ la tabulo? — 25. Kiu? — 26. Ĉu iu sidas sur ĉi tiu sego?

D. — 1. Kalkulu de unu ĝis 12. — 2. Kiun sumon donas 23 kaj 35? — 3. Ĉu 11 kaj 3 faras pli multe ol 9 kaj 4? — 4. Ĉu dekvin kaj ses faras pli multe ol dekses kaj tri? — 5. Kiom faras dek kaj ses? — 6. Ĉu ses kaj tri faras tiom, kiom sep kaj du? — 7. Kiom faras sesoble kvin? — 8. Dekoble sep? — 9. Sepoble kvin? — 10. Kiom estas la dek-duoblo de tri? — 11. Kiom estas la triono de dekdu? — 12. La sesono de sesdek? — 13. La kvinono de cent? —

14. Kion faras dek, cent, mil metroj? — 15. Kion faras dek, cent, mil litroj? — 16. Kion faras dek, cent, mil gramoj? — 17. Kiom da dekonoj, dudekonoj kaj kvin-dekonoj estas en cent? — 18. Citu unu ciferon. — 19. Citu unu nombron.

E. — 1. Kion vi faras? — 2. Skribu la Zamenhofan abc'on. — 3. Kion vi faras? — 4. Skribu kelkajn konsonantojn. — 5. Skribu la vokalojn. — 6. Kiom da konsonantojn enhavas la vorto « ĉevalo » kiom da vokaloj? da silabo? — 7. Kia (konsonanto aŭ vokalo) estas la unua litero de la vorto « ĉevalo »? Kiu estas la unua litero de la vorto « ĉevalo »? la dua, la tria, la kvara? la lasta, la antaŭlasta? — 9. Nomu kelkajn ĉefurbojn? — 10. Citu kelkajn urbojn. — 11. Ĉu la Parizanoj logas en Berlino? — 12. Kiel oni nomas la logantojn en Londono, Madrido, Konstantinopolo, Pekino, Algero, Ateno, Romo? — 13. Citu ĉefajn landojn eŭropajn. — 14. Citu la kvin mondpartojn. — 15. Kio estas inter Dovro kaj Kalezo? inter Francujo kaj Algérie? — 16. Kie estas Atlantiko? — 17. Nomu kelkajn riverojn, unu rivereton. — 18. Kelkajn montojn kaj montarojn. — 19. Kie estas ebenajoj? — 20. Kiu lando estas tre monteca? — 21. Kio karakterizas la landojn platajn. — 22. De kio la landoj montecaj estas karakterizataj? — 23. Kiel oni nomas tre malgrandajn montojn, riveron, maron, landon, urbon, tablon? — 24. Kiel oni nomas tre grandajn montojn, riveron, maron, landon, urbon, tablon?

OKA LECIONO

Vestajoj : ĉapelo, kulumo (de la ĉemizo), kravato, manumo (de la ĉemizo), jaketo, maniko (de la jaketo), vešto, pantalono, piedvesto (suo, boteto, bota, k. t. p.), ŝtrumpo, ŝtrumpeto, surtuto.

Kies ĉapelo ĝi estas? Ĝi estas la ĉapelo de S^o Oreškov.

Kies pluvombrelo ĝi estas? Ĝi estas la pluvombrelo de S^o Kofman.

Korpajoj : — la kapo, la vizaĝo, la frunto, la nazo, la okulo, (la okuloj), la orelo (la du oreloj), la naztruoj, la bušo, la lipoj, la dentoj, la lango, la palato¹, la mentono, la vango, la kolo, la gorĝo, la ŝultroj, la dorso, la brusto, la brako, la mano, la fingro, la ungoj, la zono, la kruroj, la genuo, la piedoj.

La haroj, la brovoj, la okulharoj, la vangharoj, la lipharoj.

La dekstra mano, la maldekstra ŝultro.

Kie estas via jaketo, vešto, ĉapelo, kolumno, krvatavo, k. c.

Kie estas via kapo, visaĝo, dekstra mano, maldekstra kruro, k. c.

Mia, via, lia, ŝia, ĝia, sia, nia, via, ilia.

Kiom da kapoj, fruntoj, okuloj, naztruoj, nazoj, kruroj, brovoj, k. c. oni havas?

Oni havas nur unu bušon, kaj du orelojn.

Ununombro :

Multenombro :

La libro kuſas sur la tablo. La du libroj kuſas sur la tabloj.

Mi prenas la libron.

Mi prenas la librojn.

Ekzerco.

La lernanto respondu la sekvantajn demandojn :

1. Ĉu via ĉapelo kovras vian kapon aŭ viajn piedojn?

1. Estas rememorigate ke la vortoj ne jam konataj kaj ne praktike montréblaj estas tradukotaj nacienc.

— 2. Ĉu via jaketo havas manikojn? — 3. Kiom da manikoj ĝi havas? — 4. Ĉu via veŝto havas manikojn? — 5. Ĉu via pantalono kovras viajn brakojn? — 6. Kion kovras viaj botetoj? — 7. Ĉu la kapo sidas sur la ŝultroj? — 8. Ĉu frunto estas supre de la okuloj? — 9. Ĉu vi havas du nazojn? — 10. Kiom da naztruoj vi havas? — 11. Kiom da fingroj vi havas sur unu mano? — 12. Kie estas via ĉapelo? — 13. Kiom da piedoj vi havas? — 14. Kiel kolorraj estas viaj haroj? — 15. Ĉu vi havas vangharojn? — 16. Ĉu vi havas lipharojn? — 17. Ĉu vi havas bušon aŭ bušojn? — 18. Ĉu vi havas orelon aŭ orelojn? — 19. Ĉu vi havas piedon aŭ piedojn?

NAŬA LECIONO

Mi tenas la libron, en la mano. Ĉu mi tenas ion en la mano? Kion mi tenas? Mi metas la libron sur la tablon. Ĉu mi tenas ion en la mano? Ne, mi tenas nenion. Mi prenas mian ĉapelon per la mano. Per kio mi prenas mian ĉapelon?

La libro, la kreto falas. Kio falas?

Mi portas la libron sur la tablon. Mi portas la seĝon al la fenestro. Mi portas leteron al la poŝtejo. Mi donas krajonon al vi kaj vi ricevas la krajonon de mi. Oni sendas leteron al Romo, per la poŝto. Mi donas ĉi tiun libron al vi, bonvolu ĝin transdoni al S^{ro} Delmonto. Kiu donas la libron? Kiu ricevas ĝin? Kion oni sendas per la poŝto. Ĉu oni portas aŭ sendas leteron al Romo?

Mi iras trans la seĝon. Mi iras trans la tablon, (mi iras preter la seĝon kaj preter la tablon). Transiri, preteriri. Mi iras dekstren, aŭ mi dekstreniras. Mi

iras autaüen, aŭ mi antaüeniras. Mi iras tra la ĉam-bro, aŭ mi trairas la ĉambron. Mi iras supren, aŭ mi supreniras.

S^{ro} Aŭgusto havas milionon da frankoj; li estas tre riĉa, li havas multe da mono. S^{ro} Arturo havas 500 000 frankojn; li havas sufice multe da mono, li estas riĉa. S^{ro} Nikodemo havas 100 000 frankojn; li estas nek riĉa, nek malriĉa, sed bonhava. S^{ro} Niko-lao havas nur du frankojn; li estas malriĉa. Kiu estas tre riĉa, riĉa, bonhava, malriĉa? Ĉu vi havas multe da mono? Ĉu vi estas riĉa?

Versajo (Versailles) estas proksima de Parizo. Postdamo estas proksima de Berlino. Ĉu Vladivos-toko estas proksima de Parizo? Ĉu ĝi estas malproksima de ĝi?

Kiom da dentoj oni ordinare havas? Ĉu mi mon-tras ĉiujn, miajn fingrojn? (aŭ ĉu mi montras al vi, ĉiom da miaj fingroj)? Ne, vi montras neniom da fingroj. Ĉu vi havas iom da mono? Oni havas dek fingrojn; kiom sur unu mano? Kiom da dentoj sur unu makzelo oni havas?

Kiom, Iom, neniom, ĉiom, tiom, multe da, mal-mute da, sufice da, iom da.... kiom da, pli multe da, plej multe da, nesufice da.

Ĉu vi havas multajn librojn (aŭ multe da libroj)? Ne, mi havas nur kelkajn librojn (aŭ kelke da libroj).

Kiel koloraj estas tiuj du libroj? Unu estas verda, kaj la alia estas flava.

« Mi havas dek frankojn en mia monujo » : *tio estas frazo.*

« Kiom da mono vi havas en via monujo? tio estas *demando*.

« Mi havas dek frankojn » : tio estas *respondo*.

Mi demandas vin pri via kiomo da mono; vi respondas mi al pri via kiomo da mono.

La vorto « skribmašino » komenciĝas per la litero *s* kaj finiĝas per la litero *o* (gia komenciĝo estas *s* kaj gia finiĝo estas *o*). Kio estas la komenciĝo de la vorto « kurso », de la vorto « ĉemizo », de la vorto « ĥemio »? Iliaj finiĝo?

skribi	ion	skribi	al	iu
paroli	ion	paroli	al	iu
diri	ion	diri	al	iu
citi	ion	citi	al	iu
respondi	ion	respondi	al	iu
demandi	pri io	demandi		iun

mal- ned-
Demando. proksime. proksime. finite. nee. akuzativo.

<i>Loko</i> :	kie?	ĉi tie	tie	ie	nenie	kien?	ĉi tien	ktp
<i>Persono</i> :	kiu?	ci tiu	tiu	iu	neniu	kiun?	ĉi tiun	—
<i>Objekto</i> :	kio?	ĉi tio	tio	io	nenio	kion?	ĉi tion	—
<i>Speco</i> :	kia?	ĉi tia	tia	ia	nenia	kian?	ĉi tian	—
<i>Posedo</i> :	kies?		ties	ies	nenies			
<i>Nombro</i> :	kiom		tiom	iom	neniom			
<i>Tempo</i> :	kiam		tiam	iam	neniam			

Ekzerco.

La lernanto respondu skribe la sekvantajn demandojn.

1. Kion vi tenas en la mano? — 2. Ĉu vi tenas libron en la mano? — 3. Sur kion vi metas la libron? — 4. Ĉu mi tenas ion en la mano? — 5. Kion mi prenas per la mano? — 6. Kio falas? — 7. Kion vi portas al la fenestro?

— 8. Kien vi portas la seĝon? — 9. Kien vi portas leteron?
— 10. Kion oni sendas per la poŝto? — 11. Kion vi transdonas al S^{ro} Delmonto? — 12. Al kiu vi transdonas la libron? — 13. Kiel vi iros? — 14. Kien vi iras? — 15. El S^{roj} Aŭgusto kaj Arturo, kiu estas la pli riĉa? la malpli riĉa? — 16. El S^{roj} Aŭgusto, Arturo kaj Nikodemo, kiu estas la malplej riĉa? la plej riĉa? — 17. Ĉu S^{ro} Nikolao estas riĉa? — 18. Ĉu vi estas riĉa? — 19. Ĉu Versajo estas proksime de Parizo? — 20. Ĉu Londono estas proksima de Vladivostoko. — 21. Kiom da dentoj vi havas? — 22. Ĉu vi montras ĉiujn viajn fingrojn? — 23. Ĉu vi montras ĉiom da viaj fingroj? — 24. Kiom da fingroj vi montras? — 25. Ĉu vi havas iom da mono? — 26. Kiom da fingroj oni havas sur unu mano? — 27. Kiel koloraj estas ĉi tiuj du seĝoj. — 28. Citu frazon. — 29. Citu demandon. — 30. Citu respondon. — 31. Per kia litero komencigas la vorto « tramvojo »? — 32. Per kiu litero komencigas ĉi tiu vorto? — 33. Per kia litero ĝi finiĝas? — 34. Per kiu litero ĝi finiĝas?

DUA PARTO

ELEMENTAJ LEGAĴOJ KAJ INTERPAROLADO

KONSILOJ AL LA INSTRUANTOJ

En la sekvantaj lecionoj la novaj vortoj ne estas longe kompreningataj per diversaj ekzemploj. La instruanto do devas ĉe ĉiu nova esprimo, fari al la lernanto tiajn demandojn, ke li ĉiufoje responde uzu la diritan novan esprimon.

La instruanto neniam demandos la lernanton ĉu li komprenis, ĉar ĉi tiu ne povas mem jugi, ĉu li senerare aŭ erare komprenis. Anstataŭ tio, la instruanto devas demandi la lernanton tiel, ke ĉi tiu montru klare kiel li komprenis la vorton.

La vortojn neekzistantajn en la nacia lingvo de la lernanto, nekompreningebajn aŭ ne facile kompreningebajn per la apudteksto, la instruanto tuj klarigos per la nacia lingvo, ekz. bovo, ĉevalo, veturi, vojaĝi, miozoto. Sed neniam li reuzos en la frazoj nezamenhofajn vortojn. La traduko de tiaj vortoj estas nur por forigi la necesacon de vera magazeno da pentraĵoj aŭ ne devigi la instruanton al ridinda mimiko.

Sed principe la lerniganto tradukos nur, kiam estus preskaŭ neeble fari alie; la tradukovorto povas ja signifi diversajn sencojn en la nacia lingvo, ekz.

la franca traduko de « skribi » signifas ankaŭ « verki »; kalkuli ankaŭ « fidi pri »; « hejtado » tradukita anglen povas signifi ankaŭ « brulaĵoj », la germana traduko de « plafono » ankaŭ signifas « kovrilo ». La malklareco povas esti ankoraŭ pli grava kiam oni tradukas voĉe : lot, l'eau, laid, lait, les; cours, cour, court. La traduko devos do esti nur malofta malbonaĵo. Ordinare la vortoj tradukotaj ja estas montrataj de steleto. Sed nenio povas estis absoluta pri tio, ĉar ia popolo povas kompreni ian vorton per sia propra lingvo, aliaj ne.

ELEMENTAJ LEGAĴOJ KAJ INTERPAROLADO

LA TEMPO

Nun estas la 21^a horo (aŭ la 9^a horo posttagmeze). Per kio mi scias la horon? Per mia poŝhorloĝo (aŭ horloĝeto). Sur la ciferplato¹ de mia horloĝeto estas la horoj. Super la ciferplato, iras du montriloj : granda montrilo (aŭ minuta montrilo) kiu montras la minutojn, kaj malgranda montrileto (aŭ hora montrilo) kiu montras la horojn. Sesdek sekundoj faras unu minuton, kaj unu horo konsistas el sesdek minutoj. La tagnokto enhavas 24 horojn; de la unua ĝis la dekdua estas la mateno; de la 12^a ĝis la 18^a estas la posttagmezo; post la 18^a ĝis la 24^a estas la vespero. La tago daŭras de la 6^a ĝis la 18^a (proksimume); dum tiu tempo, estas hele; oni povas vidi (per la okuloj) la objektojn ĉar la suno lumas. La suno supreniras oriente, kaj subeniras okcidente. La nokto daŭras proksimume de la 18^a ĝis la sekvanta mateno. Dum la nokto la suno* jam ne lumigas al ni; sed oni vidas la palan lunon,

1. Ĉiam traduki se necese.

kaj la belajn stelojn* (planedojn, k. t. p). Dum la nokto, estas malhele en la ĉambroj; por vidi oni bruligas lampon. Estas gas-, petrol-, elektro-, acetilenlampoj. Ludoviko enlitigas en la 23^a horo kaj ellitiĝas en la 6^a. Li dormas dum 7 horoj. Li kuŝas en lito, kiu havas du blankajn littukojn, kaj ruĝan littkovrilon. Post lia ellitiĝo (en la mateno) li purigas sian korpon per freŝa akvo. Akvo kun sapo plibone purigas la korpon. Nun estas 15 minutoj post la deka (horo) (post la komenciĝo de la tago). Nun estas 18 h. 35, 23 h. 55, k. t. p. En kioma horo ni nun estas! En kioma tago ni estas? En kiu tago. Kiu tago? (labora aŭ ripoza). Oni ekbruligas petrollampon per alumeto kaj elektrolampon turnante butonon.

Unu semajno konsistas el sep tagoj; unu monato enhavas ĉu 28, ĉu 29, ĉu 30, ĉu 31 tagojn. Dekdu monatoj faras unu jaron. Ni nun estas en la jaro 1904. Tri monatoj estas kvaronjaro; ses monatoj estas duonjaron. Ĉi tiu gazeto eliras ĉiutage. Tiu revuo eliros ĉiusemajne, ĉiutage, ĉiuduonjare. La revuo, kiun mi legis, estas ĉiukvaronjara. Cent jaroj faras unu jarcenton; mil jaroj estas unu jar-milo.

Nun estas la 20^a horo. Ne, Sinjoro, via horloĝeto trorapidas, estas nur 19 h. 50. Male, estas 20 h. Via horloĝeto malrapidas. Mia horloĝeto jam ne montras la ĝustan horon, ĝi jam ne funkcias; nun estas la 5^a kaj ĝi montras la 4^{an}. Ĝi do haltis antaŭ unu horo. Kiam horloĝo haltis, oni restreĉas ĝin (aŭ pliĝuste gian risorton).

Ekzerco.

La lernanto respondu la jenajn demandojn :

1. Kioma horo nun estas? — 2. En kioma horo vi venas al la kurso por lerni lingvon Esperanto? — 3. En kioma horo vi foriras de ĝi? — 4. El kiom da sekundoj konsistas unu horo. — 5. Kiom da minutoj estas en unu horo. — 6. Kiom da horoj enhavas unu tago? — 7. Ĉu estas hele dum la tago? — 8. Ĉu estas hele aŭ malhele dum la nokto? — 9. Kiam estas la mateno, la tagmezo, la vespero, la nokto? — 10. Dum la nokto, kiel oni povas vidi? — 11. Ĉu oni ekbruligas petrollampon turnante-butonon aŭ kiel? — 12. Ĉu oni vidas la sunon dum la nokto? — 13. Kion oni tiam vidas? — 14. Kie subeniras la suno? — 15. Kie ĝi supreniras? — 16. En kioma jaro ni nun estas?

Refari la demandojn.

1. Unu semajno konsistas el sep tagoj. — 2. Unu monato enhavas ĉu 28, ĉu 29, ĉu 30, ĉu 31 tagojn. — 3. La jaron oni dividas je 12 monatoj. — 4. Estas sesonjaro, kvaronjaro. — 5. Estas ne unu, sed du montriloj super la ciferpinto de mia horloĝeto. — 6. Estas minuta kaj hora. — 7. Mi enlitigas ordinare (preskaŭ ĉiutage) en la 23^a. — 8. Mi ellitigas en la 6^a. — 9. Mi dormas dum sep horoj. — 10. Unu semajno konsistas el tagoj. — 11. Ne; mia horloĝeto trorapidas. — 12. Jes, la horloĝeto de S^o Ludo-viko trorapidas.

LA TEMPO (*daŭrigo*).

Semajno enhavas sep tagojn, kiujn oni nomas : lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo. Dum la ses unuaj, oni laboras, ili estas

laboraj tagoj; en dimanĉo, oni ripozas aŭ promenas, ĝi estas ripoza tago.

La jaron oni dividas je dekdu monatoj, kiuj estas la jenaj : januaro, februaro, marto, aprilo, majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, oktobro, novembro, decembro.

La jaro enhavas **kvar sezonojn aŭ jarpartojn**; printempo, somero, aŭtuno kaj vintro. Post ĉiu jarkvaro, la monato februaro havas 29 tagojn, jaron kiu havas tiel 366 tagojn, oni nomas « superjaro ».

La printempo komenciĝas la 21^{an} de marto kaj finiĝas la 21^{an} de junio. Dum la printempo la kampanjo verdiĝas. La vetero estas tre ŝanĝigema. Jen oni vidas la sunon sur blua ĉielo, jen la ĉielo estas griza, kovrita de nubo; kiam la nubo estas tre densaj (dikaj kaj nigrat) pluvas (falas akvo sur la teron). En la printempo la temperaturo estas varmeta aŭ freŝa; la termometro² montras maksimume 28 gradojn kaj minimume nur ok aŭ dek super la nulo.

Dum la somero, kiu daŭras de la 21^a de junio ĝis la 21^a de septembro, la vetero estas pli seka (pluvas malpli ofte); tiam la pluvo ofte venas kun fulmotondro. La fulmo estas granda brilo (eklumo), kaj la tondro estas bruego *. La fulmon oni vidas per la okuloj, kaj la tondron oni aŭdas per la oreloj. Ĉe la somero estas multe pli varme ol printempe; la termometro montras iasoje eĉ pli ol 33 gradojn super

1. Por komprengi jen... jen : Ĉe la ekvatoro estas ĉiam varme; ĉe la norda poluso estas *neniam* varme, sed ĉiam malvarme. En Francujo (lando kie estas Parizo) estas *jen* varme, *jen* malvarme (en somero estas varme, en vintro estas malvarme)

2. Aŭ varmgradilo.

la nulo. En la somero neniam frostiĝas. Dum la somero oni banas sin en la akvo de la riveroj kaj de la maro. Trouville (Truvil) kaj Ostendo estas la plej famaj sablobordoj en la mondo; oni tie vidas multe da diversnaciaj sinbanantoj.

Aŭtuno komenciĝas la 21^{an} de septembro kaj finiĝas la 21^{an} de decembro. En ĝi la vetero estas unue susiĉe seka kajialoke tre agrabla (nek tro varma, nek tro nevarma); sed la dua parto estas tre pluvema (ofte pluvas).

Vintro daŭras de la 21^a de decembro ĝis la 21^a de marto. En vintro ofte pluvas kaj neĝas. La neĝo kovras la teron kiel blanka tapiŝo. Tiam frostas¹ ofte; oni portadas dikajn vestojn por sin ŝirmi kontraŭ la malvarmo. Oni ne eliras kun bastono, sed kun pluvſirmilo. En la nordaj landoj, kiam la riveroj glaciĝas, oni glitas sur ili per glitiloj, sur la glacio.

Dum la somero, iafoge, falas glaciigintaj akveroj; oni tiam diras ke hajlas.

Dum junio, la noktiĝo (tuj post la sunkuŝiĝo) daŭras preskaŭ ĝis la tagiĝo (heleco antaŭ la sunleviĝo); estas senĉesa (kiu ne havas ĉeson) krepusko (intertagnokto).

Kiun jarparton vi pliamas? Kial?

LA FAMILIO²

Cezaro naskiĝis en la jaro 401^a antaŭ Jesuo-Kristo (aŭ la Kristana tempokalkulo) kaj mortis en la jaro

1. Sub la nulo (0°) la akvo* glaciĝas, tiam frostas.

2. Igu la lernanton ĉi tiun lecionon traduki nacien.

44^a ant. J. K. Mahomedo naskiĝis en la jaro 571^a post J. K. kaj mortis en la jaro 631^a p. J. K. Georgo Vašington naskiĝis en la jaro 1732^a kaj mortis en la jaro 1799^a. Georgo Vašington do *vivis* dum 67 jaroj, aŭ mortis (estante) 67-jara. Naskiĝi kaj morti estas naturaj, sekve kompreneblaj vivelmontroj. Tamen, multe da homoj rifuzas ilin konsideri nature kaj filozofie.

Sinjoro Jakobo kaj Sinjorino Rahelo Majer (aŭ *Gesinjoroj Majer*) estas *geedzoj*; S^o J. estas la edzo de S^{ino}. R. kaj S^{ino} estas la edzino. Ili *edziĝis* antaŭ 30 jaroj (ili do vivas kune de 30 jaroj). *Gesinjoro Majer* havas 4 infanojn : du filojn : Paŭlo kaj Emilo; du filinojn : Mario kaj Alfonsino. S^o Majer estas la patro de siaj infanoj, kaj S^{ino}. Majer la patrino. Paŭlo estas la frato de Emilo, Mario kaj Alfonsino. La filinoj estas la fratinoj de la fratoj. Patro kaj patrino estas gepatroj, frato kaj fratino estas gefratetoj. Filo de filo estas nepo. Filo de frato estas nevo. Frato de patro aŭ patrino estas onklo. Patro de patro estas avo. Avo de patro estas praavo. Filo de nepo estas pranepo. Filo de nevo estas pranevo. La infanoj de du fratoj estas kuzoj. La edzino de frato estas bofratino. La patro de edzino estas bo-patro. La edzo de filino estas bosilo. Viro, kies edzino mortis, estas vidvo. La infanoj de vidvino kiu reedziniĝas, estas duoninfanoj de la nova edzo. Duonfilo, duonfilino, duonfrato, duonpatrino.

Ekzerco.

Repondu la sekventojn demandojn.

1. En kioma jaro naskiĝis Cezaro? — 2. En kioma jaro li mortis? — 3. Kiom da jaroj vivis Georgo Vašington? — 4. Kiomjara mortis Vašington? — 5. Kio estas geedzoj? — 6. Antaŭ kiom da tempo geedziĝis Gesinjoroj Majer? — 7. Kiom da infanoj ili havas? — 8. Kiu(j) nomojn havas la du filoj, la du filinoj? — 9. Ĉu Mario kaj Alfonsino estas la fratoj aŭ la fratinoj de Paŭlo kaj Emilo? — 10. Kiu estas la patro de Paŭlo? — 11. Kiu estas gefratoj? — 12. Kio estas onklo? — 13. Kio estas avino, praavino, pranepino? — 14. Kio estas filo de nevo. — 15. Kio estas kuzoj? — 16. Kio estas bofilino? — 17. Kio estas bopatrino? — 18. Kio estas virino (aŭ Sinjorino) kies edzo mortis? — 19. Kio estas duonfilo?

LA SENTOJ KAJ LA HOMAJ BEZONOJ

Oni *aŭdas* per la oreloj, *vidas* per la okuloj, *flaras* per la nazo, *gustumus* per la lango kaj la palato, kaj *palpas* per la fingroj. Per kio oni aŭdas, vidas, k. c.

La aŭdo, la vido, la flaro, la gustumo kaj la palpo estas la kvin *sentoj* de la homo. Kiom da sentoj havas la homo?

Oni parolas per la buŝo.

Oni *spiradas* per la *pulmoj*, kiuj sidas en la brusto. Tra nia tutaj korpo, iras ruĝa sango, forpelita de la koro. La koro, kiel la pulmoj, sidas en la brusto.

Oni *manĝas* kaj *trinkas* per la buŝo. Oni manĝas ĉiujn *manĝaĵojn*, kaj trinkas ĉiujn *trinkaĵojn*. Oni

manĝas *viandon* de bestoj; *fišojn*; *legomojn* (terpomojn¹, fazeolojn, karotojn, salatojn, skorzone-rojn); *fruktojn* (bananojn, ananasojn, pomojn, pirojn, nuksojn, kaštanojn, persikojn, ĉerizojn, abrikotojn, figojn, vinberojn, fragojn, k. c.). Oni trinkas *akvon*^{*}, vinon, bieron, pomvinon (aŭ cidron), kafon, teon, lakton^{*} kaj alkoholajn trinkaĵojn.

En la bušo oni maĉas la manĝaĵojn per la dentoj. Poste, la maĉitaj manĝaĵoj iras al la stomako^{*}. Kiam oni malbone digestas aŭ ne digestas, oni estas malsana. La plej sanutilaj manĝaĵoj estas la fruktoj. Mi tre amas pirojn, sed ne tre pomojn ĉar ĉi tiuj difektas la dentojn. Ĉu vi amas la figojn? la kaštanojn? la abrikotojn? Kion vi pli amas la pomojn aŭ la ananasojn? Ĉu vi manĝas legomojn, fruktojn? Ĉu vi trinkas akvon, lakton, teon, kafon? Verdaj vinberoj ne estas maturaj; ruĝaj vinberoj, flavaj bananoj estas maturaj. Ĉu vi amas nematurajn fruktojn?

La manĝaĵojn oni prenas el ronda telero, kiu estas sur la tablo, kaj oni portas ilin al sia bušo^{*}, per kulero^{*} (por la supo) kaj forko^{*}. La trinkaĵojn oni trinkas el glaso^{*} (por la akvo, vino, k. c.), kaj el taso (por la kafo, teo, k. c.). Kiam mi trinkas teon, mi metas en mian tason du pecojn da sukero. Oni certigas, ke tiuj, kiuj vere ŝatas teon kaj kafon, neniam enmetas sukeron en sian tason; tiamaniere ili bone ĝin gustumas. Ĉu vi

* 1. Tra luku naciен ĉiujn vortojn ne tujkompreneblajn.

amas trinki nesukeritan teon. Ne, ĉar nesukerita leo estas maldolĉa.

Kafon oni kulturigas en Brazilujo kaj en aliaj landoj. Kiam la kafo estas matura, oni ĝin rikoltas (oni deprenas ĝin de la kafarboj). La piroj kreskas sur la pirarboj. Kie kreskas la pomoj, la vinberoj, la bananoj, k. c.? La arboj portas verdajn foliojn kaj blankajn (ordinare) florojn; de tiuj floroj venas la fruktoj. Ĉu vi amas la florojn? En mia ĝardeno estas multe da fruktarboj kaj floroj: miozotoj ¹, violoj, rozoj, siringoj, lilioj, krizantemoj, papavoj, cejanoj.

Ekzerco.

La lernanto respondu la jenajn demandojn.

1. Per kio oni aŭdas? — 2. Per kio oni vidas? — 3. Ĉu oni vidas per la nazo aŭ per la oreloj? — 4. Per kio oni flaras? — 5. Per kio oni gustumas? — 6. Per kio oni palpas? — 7. Kiuj estas la kvin sentoj homaj? — 8. Kiom da sentoj havas la homo? — 9. Per kio oni parolas? — 10. Per kio oni spiras? — 11. Kie sidas la pulmoj? — 12. Kio trakuras nian korpon? — 13. Kion forpelas la koro? — 14. Kion oni faras per la bušo? — 15. Per kio oni mangas kaj trinkas? — 16. Ĉu oni mangas trinkajojn kaj trinkas mangajojn? — 17. Kion oni mangas? — 18. Kion oni trinkas? — 19. Nomu kelkajn mangajojn? — 20. Nomu kelkajn trinkajojn. — 21. Ĉu vi trinkas alkoholajojn? — 22. Nomu kelkajn legomojn? — 23. Nomu kelkajn fruktojn? — 24. Ĉu vi trinkas kafon? — 25. Kion oni maĉas per la dentoj? — 26. Kien iras poste la mangajoj? — 27. Ĉu oni estas malsana kiam oni bone digestas?

1. Traduku nacien se necese.

— 28. Kio malsanigas la homojn, laŭ la vegetaristoj? — 29. Ĉu la viando de mortintaj bestoj estas sanutila? — 30. Kio estas alkoholo? — 31. Kiuj estas la plej sanutilaj mangajoj? — 32. Ĉu vi amas la pirojn? — 33. Ĉu vi pli amas la pomojn? — 34. El kio oni prenas la mangajojn kiam oni mangas? — 35. Kion oni alportas al sia bušo? — 36. Al kio oni alportas la mangajojn? — 37. Per kio oni portas la mangajojn al sia bušo. — 38. Per kio oni alportas al sia bušo la supon? — 39. El kio oni trinkas akvon? — 40. El kio oni trinkas teon. — 41. Ĉu nesukerita kafo estas dolēa? — 42. Kie oni kulturigas la kafon? — 43. Kion oni faras kiam la kafo estas matura? — 44. Ĉu la kafarboj portas la kafon? — 45. Sur kio kreskas la piroj? — 46. Kie kreskas la pomoj, la vinbero, la bananoj? — 47. Kiel koloraj estas la floroj portataj de la arboj? — 48. Nomu kelkajn florojn. — **49. Kiun vi plej amas?**

KONJUGACIO

Tempo « Estanta » : « as ».

Hodiaŭ, 26^{an} de oktobro 1904 : mi maršas; mi skribas; mi parolas; mi prenas la libron; mi lernas la lingvon Esperanto; mi sidiĝas sur la seĝon

Tempo « Estinta » : « is ».

Hieraŭ, 25^{an} de oktobro 1904 : mi maršíis; mi skribis; mi parolis; mi prenis la libron; mi lernis la lingvon Esperanto; mi sidiĝis sur la seĝon.

Tempo « Estonta » : « os ».

Morgaŭ, 27^{an} de oktobro 1904 : mi maršos; mi skribos; mi parolos; mi prenos la libron; mi lernos la lingvon Esperanto; mi sidiĝos sur la seĝon.

Kondiĉa Modo.

Se li venus, mi estus kontenta, Se mi povus, mi mangus. Se mi havus multe da mono, mi estus riĉa, sed mi ne havas multe da tio. Se mi estus laborinta, mi estus pli riĉa. Se vi estus lerninta, vi estus pli instruita. Se mi estus riĉa, mi havus multe da amikoj.

Ekzerco.

La lernanto respondu la jenajn demandojn.

1. Ĉu vi laborus, se vi estus riĉa? — 2. Ĉu vi promenus se pluvus? — 3. Ĉu vi parolus la lingvon Esperanto, se vi ne estus ĝin lerninta? — 4. Se vi havus nur sepdek centimojn, ĉu vi estus riĉa? — 5. Ĉu vi povus tuŝi la plafonon, se vi suprenirus sur la seĝon? — 6. Ĉu vi volus lerni la rusan lingvon?

LA DOMO

Mi loĝas 105, strato Liceo, en Havro. Kie vi loĝas? Havro estas urbo; ĝi enhavas 130 000 loĝantojn. Mi loĝas en ĉambrara domo; oni eniras unue en la vestiblon. Ĉambraro konsistas ordinare el kuirejo, kie oni kuiras la mangajojn; mangōĉambro (aŭ mangajo), kie oni mangas; salono (aŭ parolejo), kie oni interparolas; dormejoj (aŭ dormoĉambroj), kie oni dormas dum la nokto; tualetejo, kie oni purigas sian vizaĝon. La harojn oni kombas per kombilo. En mia domo estas, krom la teretaĝo, kelkaj etaĝoj, al kiuj oni

supreniras per ŝuparo. La dormejoj estas sub la tegmento, kien oni supreniras per ŝuparo*.

LA MINERALOJ KAJ MATERIOJ

Ĉi tiu tablo estas farita el ligno. De la arboj ni prenas la lignon. Ĉi tiu ŝlosilo estas el fero. Mia horloĝeto estas farita el ŝtalo, fero, argento, oro. De Havro ĝis Parizo estas longa vojo, sur kiu oni piediras, veturas, rajdas, k. t. p. Sed por iri pli rapide, oni uzas la fervojon, sur kiu iras vagonoj kun lokomotivoj (vagonaroj). Mia horloĝeto estas el aluminio.

Subst.: ferfandaĵo, kupro, zinko, fero, nikelo, porcelano.
Adjekt.: ferfandaja, kupra, zinka, sera, nikela, porcelana.

Feron, argenton, nikelon, kupron oni eltiras el fosejoj (aŭ minejoj).

Mia jaketo estas farita el lano. Ĉemizo estas farita el tolo aŭ kotono. La tolon ni faras el lino aŭ el kanabo. Kotonon ni ricevas el kotonarbo, kiu kreskas en Ameriko, Egiptujo kaj Hindujo. Silkfara raŭpo donas al ni la silkon, el kiu oni faras belajn vestojn. Veluro. El tolo oni faras diversajn tolajojn : buŝtukon, naztukon, tablotukon, ĉemizon, k. t. p. El kotono oni faras diversajn kotonajojn : ĉemizojn, naztukojn, k. t. p.

Ĉi tiu libro estas farita el papero, kaj la kovrilo de ĉi tiu libro (aŭ ĝia kovrilo) estas farita el kartono.

Rigardante trans la fenestron, oni vidas tra la

vitro; vitro estas materialo travidebla. Ĉu ligno estas travidebla?

VOJIRO AL PARIZO

Invito : S^o Kavaliro. Bonan tagon, S^o Delmonto, kiel vi fartas? — S^o Delmonto. Bone, dankon, kaj vi? Kia estas la kaŭzo de via vizito? — S^o K. Mi venas informi vin ke mi havos mian someran libertempojn de morgaŭ matene, kiel vi. Ĉu do, kiel vi promesis al mi, vi konsentus kuniri kun mi por viziti Parizon? — S^o D. Tre certe¹, mia amiko, kun granda plezuro. S^o K. Ĉar do vi konsentas, ni foriros morgaŭ matene, je 6 h. 40 per la rapida vagonaro. La vagonirado daŭros nur 3 horojn 1/2. — S^o D. Bone. Ĉu vi do bonvole venos al ni je la 6^a h.? — S^o K. Jes, plezure.

Foriro : S^o K. Bonan tagon. — S^o D. Mi pensas ke vi venis iom frue, estas apenaŭ 5 h. 45 (45 minutoj post la kvina). — S^o K. Kontraŭe; ni bezonas rapidi por esti preta atingi ĝustatempe la vagonaron; mia valizo estas ankoraŭ ne tute plena, sed mia vestokesto estas tute pretigita. — S^o K. Ĉu vi do preterpasigis la horon? — S^o D. Ne, ĉar mi preskaŭ neniom dormis dum la tuta nokto; sekve mi estas tre laca. — S^o D (post momento). Nun, ĉio estas preta, la veturilo atendas nin; mi alvokos la serviston, ke li transportu mian keston sur la veturilon.

1. Pliforta ol « jes ».

Ĉi tiu kesto ja multe pezas, almenaŭ 80 milgramojn.

En la stacidomo : S^o K. Dum vi enskribigos viajn pakajojn, mi aĉetos la biletōjn. — S^o D. Bone. — S^o K. Kie do estas trovebla la biletvendejo? Ha! jen ĝi estas. — Al la oficisto. Donu al mi, mi petas, du biletōjn duaklasajn al Parizo, iro kaj reveno; kiom ili kostas? — La oficisto, fr. 56, 40. — S^o K. Jen estas!

S^o K. al S^o D. Ha! vi jam enskribigis viajn pakajojn. — S^o D. Jes, ne estis longe, ĉu ne? — S^o K. Certe ne, mi pensis ke estos pli longe. — S^o D. Mi rimarkas ke ni alvenis sufie frue, la lokomotivo ne estas ankoraŭ jungita kun la vagonaro. — S^o K. Jes, sed ni tuj supreniru en kupeon, por trovi bonajn angulojn, ĉar estas multe da personoj sur la enventurejo.

La alveno : Ni pretiĝu; ni alvenas, mi jam vidas la ĉefajn monumentojn de la ĉefurbo : la Ejselturon, la Radegon (aŭ grandan Radon), la Triumfarkon, la Panteonon kaj la monteton de Montmartre (Monmartr). Nun, ni eniras en la tunelon.

En la stacidomo : S^o K. Kia popolamaso! rapidu elpreni viajn pakajojn, kaj mi tuj elektos fiakron, por iri al la hotelo.

Ĉe la hotelo : S^o K. Ĉu vi parolas Esperante? — Jes, Sinjoro, kion vi deziras. — Ĉu vi havas du ĉambrojn? — Sufie grandajn kaj aerhavajn? — La oficisto de l'hotelo. Jes Sinjoro, se vi bonvole venas kun mi, mi vidigos ilin al vi. Ni supreniru per levi-

ĝilo. Ĉu ĉi tiuj ĉambroj plaĉas al vi? — S^o D. Ne, ili ne estas sufice helaj. Ni volas aliajn. — La oficisto. Ni iru do sur la supran etaĝon, mi havas kion vi deziras. — S^o K. Bone, ni luas ilin. — S^o B. Por kiom vi luigas ilin? — Ĉiun po kvin frankoj por unu tago. — S^o B. Konsentite.

La posttagmezo: S^o K. Se vi konsentas, ni nun iros promeni en Parizo. — S^o D. Tre volonte sed ĉar vi jam konas Parizon, veninte kelkfoje ĝin viziti, mi petas vin gvidi min. — S^o K. Mi tre plezure konsentas esti via gvidonto en la granda urbo.

Sur la strato: Jen estas la strato Auber; en ĉi tiu kvartalo¹ oni vidas multe da anglaj butikoj; de tajloroj, kiuj vendas vestojn laŭmezurajn (kaj ne antaŭfaritajn kiel en la grandaj magazenoj); de ŝuvendejoj; societoj marŝipaj, kiuj liveras, ekzemple, biletojn por iri de Havro aŭ Ĉerburgo marŝipe ĝis Nov-Jorko, k. t. p. Jen estas la placo de l'Opero, antaŭ la stratego de l'Opero, kaj ĉe la du flankoj orientaj, kaj okcidentaj la famaj bulvardoj. Jen estas skribmašinvendejoj; luksajvendejoj, grandaj bankoj, k. t. p. Sur la bulvardoj promenas multe da personoj, kaj iras multe da movveturiloj (aŭtomobiloj), fiakroj, omnibusoj, luksaj veturiloj k. t. p.

S^o Delmonto. Ĉu ni haltos en ĉi tiu kafejo? ĉar ne nur, pro tiu varmega vetero, mi tre soifas, sed mi ankoraŭ deziras (volas) sendi ilustritajn poštkartojn al mia edzino kaj al kelkaj amikoj? — S^o Kavaliro. Kiel vi deziras. Mi ja scias ke la poštcartoj

1. Urboparto.

fariĝis de kelkaj jaroj kutimo iom teda (malagrabla) iaofoje, kvankam kelkafoje tre agrabla. — S^o D. Mi ankaŭ opinias ke tio iĝas tiranajo trudata al malfeliĉa vojiranto, kiu laca post plena marŝtago, ne povas ripovi, sed devas skribi, skribi ree, kaj ĉiam skribi. — S^o K. Ni nun povas iri al la bordoj de la Sejno, rivero kiu trairas Parizon; ĉirkaŭ la Pont des Arts¹ (Pontodel'Artoj), ĉe kies finiĝo estas la Franca Akademiaro, oni ĝuas pentrindan vidajon. — S^o D. Nun estas la 48^a h.; ĉu ni iras vespermanĝi. — S^o K. Mi ne rifuzas (malkonsentas) ĉar mi tre malsatas (bezonas manĝi), sâjnas al mi ke de du tagoj mi ne manĝis. — S^o D. Kaj mi estas ankaŭ tre *laca*, miaj kruroj baldaŭ rifuzos min portadi pli longe; mi ja estas sendonta post la vespermanĝo, malbenindajn poštarkojn ilustritajn?

PLENA GRAMATIKO DE LA LINGVO INTERNACIA

A. Abc'o.

Aa, Bb, Ce, Ĉe, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝg, Hh, Ĥh, Ii, Jj, Ĵj, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝs, Tt, Uu, Vv, Zz.

RIMARKO. Presejoj, kiuj ne posedas (havas) la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ū, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u.

1. Elparolu « Ar ».

B. Reguloj^{1.}

1. — *Artikolo* nedifina ne ekzistas; ekzistas nur **artikolo** difinita (*la*), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj. Ekz. : *la patro*, *la patrino*, *la seĝo*.

RIMARKO. La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilajon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.

2. — La *substantivoj* havas la finiĝon *o*, ekz : *patro*, *filo*, *vorto*, *vagono*, *rapidskribo*. Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon *j*, ekz. : *du pomoj*, *du fratoj*; kazoj ekzistas nur *du* : nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finiĝo *n* (ekz. : *patron*, *patrinojn*). La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per *de*, la dativo per *al*, la ablativo per *per* aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco).

3. — La *adjektivo* finiĝas per *a* (*patra*, *patrina*, *bela*, *ruĝa*). Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo. La komparativo estas farata per la vorto *pli*, la superlativo per *plej*; ĉe la komparativo oni uzas la prepozicion « *ol* ».

4. — La *numeraloj* fundamentaj (ne estas deklinaciataj) estas : *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunligo de la numeraloj. Por la

1. Estas konsilinde elekti iajn radikvortojn kaj igi la lernantojn almeti al ili ĉiun regulon. Ĉar la ĉiujn radikojn oni ne ĉiam povas same deklinaci, taŭgas ŝanĝi ilin laŭ bezone.

signado de numeraloj ordaj oni aldonas la finiĝon de la adjektivo (la unua, dua); por la multoblaj la sufikson *obl* (duobla, dekoblo), por la nombronaj *on* (duono), por la kolektaj *op* (duope), por la dividaj, la vorton *po* (po unu). Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivaj kaj adverbaj (cento, 4^o unue).

5. — *Pronomoj* personaj : *mi vi, li, ŝi, ĝi* (pri objekto aŭ besto) *si, ni, vi, ili, oni* (li lavas sin, ŝi lavas kaj ili lavas sin mem); la pronomoj posedaj estas formataj per la aldono de la finiĝo adjektiva (*mia*). La deklinacio estas kiel ĉe la substantivoj k. c.

6. — La verbo ne estas ŝangata laŭ personoj nek nombroj. Formoj de la verbo : la tempo estanta akceptas la finiĝon *as* (*parolas*); la tempo estinta *is* (*parolis*); la tempo estonta *os* (*parolos*); la modo ordona, *u* (*parolu*); la modo kondiĉa *us* (*parolus*); la modo sendifina *i* (*paroli*). Participoj (kun senco substantiva, adjektiva kaj adverba) : aga estanta *ant*, aga estinta *int*; aga estonta *ont*; pasiva estanta *at*; pasiva estinta *it*; pasiva estonta *ot*. Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo esti kaj la participo pasiva de la bezonata verbo; la prepozicio ĉe la pasivo estas *de*. Ekz. Tio estis rakontita *de* mi.

7. — La adverboj finiĝas per *e* (*patre, rapide*); gradoj de komparado kiel ĉe la adjektivoj.

8. — Ĉiuj prepozicioj postulas la nominativon; ekz.: Iri al Parizo. Li promenas kun sia kuzino.

9. — Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.
10. — La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.
11. — Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino) ekz. : vaporŝipo, rapidskribo, servojo); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.
12. — Ĉe alia nea vorto la vorto *ne* estas forlasata,
13. — Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo (Mi jetas la libron *sur* la tablon).
14. — Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konsstantan signifon; sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion *je*, kiu memstaran signifon ne havas (kovrigi tablon *je* tapiŝo). Anstataŭ la prepozicio *je* oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.
15. — La tiel nomataj vortoj *fremdaj*, t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvo prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante la ortografion de ĉi tiu lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el ĉi tiu lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto. Ekz. telegrafa, fonografa, teologia kaj ne : telegrafika, fonografika, theologika.
16. — La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata de apostrofo. Ekz. : Al la mond'eterne militanta.

Eltirita el la *Krestomatio* de Drº ZAMENHOF.

Prefiksoj kaj sufiksoj.

La supraj nomoj montras vortetojn kiujn oni aldinas, ĉe la komenciĝo aŭ finiĝo de radikvortoj (nom', patr', frat', estas radikvortoj). Ili estas tre utilaj, ĉar ili ebligas uzi nekalkuleblan nombron da vortoj, ne ŝarĝante la memoron.

Mal montras la rektan kontraŭajon de la ideo. Ekz. : Bona, malbona, alta, malalta, juna, maljuna, bela, malbela, gaja, malgaja, estimi, malestimi.

In montras la virinan sekson. Ekz. : Patro, patrino, frato, fratino, onklo, onklino, Aleksandro, Aleksandrina, heroo, heroino, ĉevalo, ĉevalino, k. t. p.

Il montras la instrumenton por la donita farado. Ekz. : tranĉi la viandon per tranĉilo; kombi siajn harojn per kombilo; haki lignon per hakilo; falĉi herbon per falĉilo; kudri per kudrilo, k. t. p.

Ad montras daŭron en la ago. Ekz. : Tiu homo faras belan paroladon; rigardadi pentraĵon; bataladi, rigardadi, skribadi, iradi (batali, rigardi, skribi kaj iri longatempe).

Aj montras ion posedantan la donitan econ aŭ ion faritan el, (ideo konkreta). Ekz. : Malmola, malmolajo, sukero, sukeraĵo, (kio konsistas el sukero), fruktaĵo, malagrablo (afero malagrablo), alkoholajo (kio konsistas el alkoholo), k. t. p.

An montras la membron, la loganton, la partion; ekz. : grupo, grupano; societo, societano; samideano, Parizano, Berlinano, Londonano, Madridano, Kristano, Luterano, Kalvinano.

Ar montras la kolekton, la grupon de la objektoj esprimitaj de la radikvorto. Ekz. : Vorto, vortaro, (vortaro internacia-angla, vortaro franc-angla). Vagono, vagonaro, nomo, nomaro, adreso, adresaro, homo, homaro.

Bo montras la parencecon resultantan de l'edziĝo. Ekz. : Bopatro, (patro de edzo aŭ edzino), bopatrino, bofratino.

Ĉj estas karesa malgrandigo, kiun oni uzas en la familio; oni metas ĝin post la 2-5 unuaj literoj de la nomoj viraj. Ekz. : Arĉjo anstataŭ Arturo, Paŭĉjo anst. Paŭlo, Paĉjo anst. Patro.

Nj sama uzo, sed por la virinaj nomoj. Ekz. : Johanjo anstataŭ Johanino, Josenjo austataŭ Josefino, Marnjo austataŭ Mario.

Dis montras la dividon, ĵeton ĉiuflanken. Ekz. : Semi, dissemi, ĵeti libron, disĝesti paperpecojn, kuri, diskuri (kuri ĉiu al diversaj flankoj).

Ebl kio povas esti farata. Ekz. : Kredi, kredebla (kio povas esti kredata), legi, legebla, mallegebla.

Ec montras la econ abstraktan, la staton de tiu, kiu, aŭ de tio, kio estas, bela, beleco (stato de tiu, kiu estas bela), malbeleco, juna, juneco (stato de tiu, kiu estas juna), amiko, amikeco, viro, vireco, granda, grandece, bona, boneco, malriĉa, malriĉeco, k. t. p.

Ist montras la homon, kiu sin okupas per, la profesion, aŭ la metion : Ekz. : Mašinskribisto, rapid-skribisto (aŭ stenografiisto), lavistino, kudristino, mehanikisto, veturisto, parolisto, botisto, kurac-

isto, komercisto, industriisto, maristo, instruisto.

Edz montras la aliseksan kunulon. Ekz. : Lavistino, lavistinedzo, doktoro, doktoredzino, forĝisto, forĝistedzino.

Eg, pligrandigilo, kiu plifortigas la ideon. Ekz. : Kiam estas $+ 20^{\circ}$ C. estas *varme*, kiam estas 40° C., estas *varmege*. Amazono, en Brazilujo, ne estas rivero, sed riverego. Monto alta je mil metroj, estas alta monto, alta je sesmil metroj, estas altega; pluvo, pluvego; pafi, pafegi; bastono, bastonego.

Ej montras la lokon por. Ekz. : Oni vendas en la vendeo, kuiras en la kuirejo, dormas en la dormejo; preĝejo, ludejo, lernejo, ĉevalejo, laktejo, bovinejo, oficejo, laborejo, observejo.

Ek montras agon, kiu komenciĝas, aŭ kiu estas momenta. Ekz. : Kanti, ekkanti (komenci kanti), ekkrii, ekvidi, ekdormi, ekparoli.

Em montras la inklinon al, la kutimon de. Ekz. : Kredi, kredema, tromangemo, vengi, venĝema, koleri, kolerema.

Er rekondukas al la elemento, al la unuaĵo parta. Ekz. : Mono; monero (da 5 fr., 10 fr. k. t. p.), sablo, sablero, fajro, fajrero

Estr signifas la personon superan kiu ordonas. Ekz. : Regno, regnestro; ŝipo, ŝipestro; laboro, laborestro; lernejo, lernejestro.

Et malgrandigas la ideon esprimatan de la radikvorto. Ekz. : Ĉambro, ĉambreto (malgranda ĉambro), knabo, knabeto; muro, mureto; monto,

monteto; dormi, dormeti; ridi, rideti; kanti, kanteti; infano, infaneto.

Gé kunigas la du seksulojn. Ekz.: gepatroj (la patro kaj la patrino), gefratoj, gekuzoj, geamikoj, geonkloj, gemastroj, geedzoj, gesinjoroj.

Id signifas infanon de, posteulon de... Ekz.: Bovo, bovido, koko, kokido, leono, leonido, Izraelidoj, kokidoj, ĉevalido.

Ig signifas fari tia. Ekz.: Pura, purigi (fari pura); sci, sciigi; bruli, bruligi; ekbruligi; devi, devigi; morti, mortigi; fianēi, fianēigi; venigi; pligrandigi, plimalgrandigi, malpligrandigi; for (malproksime), forigi; sen, senigi; kovri, kovrigi (mi kovrigas la tablon je tapišo, kaj nun la tapišo kovras la tablon); li koleras ĉar mi kolerigis lin, kuſigi; loĝigi; tiu homo sidas, ĉar mi sidigis lin. La vizaĝo de la infano estas pura, ĉar la patrino purigis ĝin.

Iĝ alveni en tian staton. Ekz.: Maljuna, maljuniĝi (alveni en staton maljunan), fianēo, fianēigi, edzigi, edziniĝi (por fraŭlino), sidiĝi, turniĝi, flui-digi.

Ind signifas, kiu aŭ kio meritas esti. Ekz.: Kredi, kredinda; laŭdi, laŭdinda; memori, memorienda; bedaŭrinda, honorinda.

Ing montras objekton, en kiu alia objekto estas lokita parte (nur por unu objekto). Ekz.: Glavo, glavingo, kandelo, kandelingo, plumo, plumingo, fingro, fingringo, cigaringo, cigaredingo.

Mošto ĝeneralaj titolo de gentileco, bonmaniero. Ekz.: Lia Reĝa Mošto Viktoro Emanuelo, Via Princa,

1. Por pluaj klarigoj, vidu la baldaŭ elirontan « Vortaro Tutmonda ».

Duka, Grafa, Barona, Generala, Episkopa Mošto.
Via Dukina Mošto. Via Mošto. Via Prezidanta Mošto.

Re signifas returne, denove. Ekz. : Veni, reveni; iri, reiri (aŭ iri denove), reviviĝi.

Uj montras la keston, vazon, skatolon, kuvon, k. t. p., kiu plene enhavas, kaj ankaŭ la landojn. Ekz. : Cigaro, cigarujo, mono, monujo, sukero, sukerujo, supujo, teujo, kafujo; Francujo, aŭ Franclando, Svisujo, aŭ Svislando, Germanujo, Granda Britujo, Skotujo, kaj Anglujo, Ĥinujo, Japanujo, Turkujo, Bulgarujo, Italujo, Hispanujo, Grekujo, Bohemujo, Moravujo, Polujo, Hungarujo, Hindujo.

Ul montras la estaĵon karakterizatan de. Ekz. : Juna, junulo (persono junu); maljunulo (persono maljuna); malriĉulo, riĉulo; tima, timulo; avarulo, bonulo, belulo, nigrulo, flavulo, blondulo, brunulino, altkreskulo.

Um, sufikso neofte uzata, kiu ne havas tute precizan kaj ĉiam egalan signifon, sed kiun oni komprenas el la esenco de la vorto. Ekz. : Mano, manumo, kolo, kolumno de ĉemizo, k. t. p.

POSTPAROLO

Nun finiĝas la « Kurso Tutmonda ». Per ĉi tiu libro mi nur celis liveri la fundamentajn elementojn, mi do ne pretendas liveri ĉiujn vortojn kaj esprimojn necesajn por la ĉiutaga, sciencia aŭ komerca uzado de la zamenhofa lingvo, tio estus nebla ne nur ĉe kia ajn lernolibro de ia ajn lingvo sed ankaŭ ĉe libro por la instruado natura.

Mi do konsilas al la samideanoj, kiuj volos perfektigi en la lingvo, aĉeti, ĉu unu el la diversaj libroj literaturaj en nia lingvo, ĉu plibone la libron de Dr^o Zamenhof, nomatan « Fundamenta Krestomatio de la lingvo internacia Esperanto ».

Se ili laboras sen instruanto, la lernantoj povos uzi vortaron internacia-nacian, se ili sekvis superran kurson kun instruanto, estus plibone daŭrigi la naturan metodon.

Laŭ tio, kion mi jam diris en la komenciĝo de ĉi tiu libro, la instruanto agos tiel, kiel se li volus kompreniĝi de alilandulo, kiu ne scias bone lian lingvon aŭ de infano demandema. Ekz. : por komprenigi la vortojn :

Rego : Eduardo VII^a estas rego de Anglujo, Alfonso XIII^a rego de Hispanujo. Kiu estas la rego de Portugalujo ? En Rusujo ne estas rego, sed imperiestro ; en Francujo, Prezidanto de la Respubliko ; la Prezidanto de la Franca Respubliko estas S^o Fallières.

Elspezi : Kiam vi aĉetas ion, vi donas monon al la vendisto; doni monon estas *elspezi*, ricevi monon, estas enspezi. Ĉu vi multe elspezis, enspezis hodiaŭ ?

Ornamita, de ornamo, objekto kiu beligas (broĉo, ora ĉeno, k. t. p.), do ornamita, beligita de objektoj.

Zorgi : Kiam nenio estas en sia propra loko, oni ordigas ĉion; ekz. : si bone zorgas sian ĉambron, tial ĉio estas en ordo; zorgi pri soldatoj por scii, ĉu ili bone manĝas, havas bonajn vestojn, k. t. p.

Časo : kuri al bestoj kaj mortigi ilin per pafilo (soldatojn, precipice de infanterio, havas pafilojn, per kiuj ili pafas). Oni ĉasas bestojn en la arbaroj kaj sur le kamparo.

Esceptinte, de escepti, ne kunkalkuli, ne knumeti.

Okazo : la kurso de lingvo internacia okazas ĉiumerkrede. Vintro okazas ĉiujare (alveni, havi lokon).

Ordinare, mi promenas nur unufoje en unu monato, estas maloste; S^o Delurbo promenas ĉiutage; li do ordinare (aŭ tre ofte) promenas, k. t. p.

Kiam la vorto ne estas praktike komprenigebla per ĉi tiu metodo oni povas traduki ĝin. (Ekz. : Preĝi, ministro, fabelo, k. t. p.) kaj ne uzi la metodon naturan, sed oni ne forgesu ke infanoj, naskiĝintaj en Francujo aŭ Ĥinujo, ne lernas alie sian nacian

lingvon. Tiaj komprenigoj ja havas la grandegan utilon kutimigi la lernantojn aüde kaj parole uzadi la lingvon. Estas interparoladoj, kiuj povas rilati nek al politiko, nek al religio; tia interparolado estos rimedo uzinda por la grupoj kiuj serĉas temojn por interparolado nek tro sensenca, nek opinia.

Oni ne konfuzu, se la metodo ŝajne ne donus la rezultatojn esperitajn, tio tre certe okazus ĉar la instruanto ne estus kutimigita kun la natura metodo; sed kiel mi jam diris en la antaŭparolo, mi ja restas al la tuta dispono por respondi pri ĉiuj demandoj aŭ konsilpetoj, venantaj kun aſrankita respondo.

EMILO GASSE,
105, strato Lycée, Havro, Francujo.

TABELO DE L'ENHAVO

<u>ANTAŬPAROLO</u>	5
<u>UXUA PARTO</u>	
<i>Gramatiko</i>	
<i>Konsiloj al la instruantoj</i>	9
<i>Unua leciono. — Verboj prepozicioj, adverboj</i>	13
<i>Dua leciono. — Verboj (sekvo) pronomoj demando</i>	14
<i>Trija leciono. — Prépozicioj</i>	15
<i>Kvara leciono. — Koloroj kaj grandecoj</i>	17
<i>Kvina leciono. — Numeraloj, divido, multipliko, opoj</i>	19
<i>Sesa leciono. — La a' b' c' kaj vortoj necesaj por legi kaj skribi</i>	20
<i>Sepa leciono. — Revido</i>	23
<i>Oka leciono. — Vestajoj, Korpopartoj</i>	25
<i>Naŭa leciono. — Kiomo</i>	27
<u>DUA PARTO</u>	
<i>Elementaj legaĵoj, kaj interparolaĵo</i>	
<i>Konsiloj al la instruantoj</i>	31
<i>La tempo</i>	33
<i>La familio</i>	37
<i>La sentoj. La manĝaĵoj kaj trinkajoj</i>	39
<i>Konjugacio de la verbo esperanta</i>	42
<i>La domo</i>	44
<i>La mineraloj kaj materioj</i>	45
<i>La vojaĝo</i>	46
<i>Plena gramatiko. Prefiksoj kaj sufiksoj</i>	49
<u>POSTPAROLO</u>	59

(Sekvo.)

ANGLUJO.—REVIEW of REVIEWS, Norfolk street, LONDON, W. C.

First lessons in Esperanto, by Th. Cart and J. Rhodes	6d
Esperanto : The Student's complete Text-Book, with two vocabularies by J. C. O'Connor Ph. Dr. M. A.	1s 6d
Esperanto-English dictionary, by A. Motteau.	1s 6d
English-Esperanto dictionary, by J. C. O'Connor Ph. Dr. M. A.	1s 6d
Grammar and exercises of the International Language Esperanto, by Richard H. Geoghegan.	1s 6d
Dickens, Kristnaska sonorado (A Christmas Carol), tradukita de M. Vestcott.	1s *

BELGUJO — HOLANDUJO. — A.-J. WITTERYCK-DELPLACE
4, *Nouvelle Promenade, BRUGES*

Het Esperanto in tien lessen, door A.-J. Witteryck naar Cart et Pagnier.	50
Paĝoj el la Flandra Literaturo, tradukitaj de Dr ^o Seynaeve et Dr ^o van Melckebeke	1 50

BULGARUJO. — KLUBO « STELO », PLOVDIV

Esperanto en 40 lecionoj, de Cart kaj Pagnier	1 *
Unuaj lecionoj, de Cart kaj Atanasov.	1 40
Propaganda folio.	1 10

DANUJO. — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN

Bredgade, 35, KJÖBENHAVN

Fuldstændig Lærebog i Esperanto, af F. Skeel-Gjörling.	Kr. 3 *
Esperanto-Dansk-Norsk Ordbog, af F. Skeel-Gjörling.	Kr. 3 50
Dansk-Esperanto Ordbog.	**

GERMANUJO. — MÖLLER & BOREL, Prinzenstrasse, 95, BERLIN

Anfangsgründe der Esperanto-Sprache, von Th. Cart und Hermann Jürgensen.	M 0 35
Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache, von J. Borel.	M 1 20
Wörterbuch Deutsch-Esperanto, von Dr Zamenhof.	M 2 *
Wörterbuch Esperanto-Deutsch, von H. Jürgensen.	M 1 80
Schlüssel zum Lehrbuch der Esperanto-Sprache, von J. Borel.	M 0 50
Pri unu speco de Kurbaj linioj, von Profesor A. Dombrowski.	M 0 50
Lernolibro de Esperanta Stenografio, (laŭ sistemo Stolze-Schrey) de F. Schneeberger.	M 0 80

(Turnu.)

(Sekvo.)

HISPAÑUJO. — J. ESPASA, 579, <i>Calle de las Cortes</i> , BARCELONA.	
Primeras lecciones de Esperanto de Th. Cart y L. Villanueva..	P 2
Manual y Ejercicios de la lengua internacional Esperanto, por V. Inglés Ors y A. L. Villanueva.	P 3
Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto, por Inglada Or: Villanueva.	P 6

ITALUJO. — RAFFAELLO GIUSTI
53, *Via Vittorio Emanuele*, LIVORNO

Prime lezioni d'Esperanto de Th. Cart e Alb. Gallois	P 2
Grammatica della lingua internazionale Esperanto di L. de Beaufré tradotta da G. Puccinelli.	1
L'Esperanto in dieci lezioni, di Cart e Gallois.	1
Dizionario Esperanto-Italiano, de J. Puccinelli.	1
Dizionario Italiano-Esperanto, de J. Meazzini (<i>in preparazione</i>).	1

POLUJO. — M. ARCT, 53, *Nowy Świat*, WARSZAWA

Esperanto : Czecs I Gramatyka i cwiczenia, Dr L. Zamenhof..	R 2
— Czecs II. Słownik.	R 2

PORUGALUJO. — BRAZILUJO

Primeiras lições de Esperanto, do professor Th. Cart, trad. portugue de A.-C. Coutinho, Paris, Hachette.	P 2
--	-----

SVEDUJO. — *Esperanto/örening*, STOCKHOLM

Esperanto-Svensk ordbok, de P. Ahlberg	Kr. 1
--	-------

DIVERSAJ VERKOJ

Anatomia Vortaro (kvarlingva) verkita de la Medicina Esperantista Grupo	1
Tutmonda Jarlibro esperantista por 1906.	3
Couturat (L.) et Leau (L.). — Histoire de la langue universelle. .	10
— Extraits de l'Histoire de la langue universelle.	1
Lafargue (G.). — Nécessité de l'adoption d'une langue internationale auxiliaire.	1
Sacré (E.). — L'Esperanto.	1
Thiaucourt (C.). — Dernière conférence sur la Langue Internationale Esperanto.	1
Premier manuel de la langue auxiliaire Esperanto.	1

MUZIKO

Himno al Zamenhof, paroloj kaj muziko de R. Deshays.	1
La Kanto de l'Cigno, (melodio) poemo de Sviridov, muziko de F. Ménil	1

1956-06. — Coulommiers. Imp. PAUL BRODARD. — 9-06.

PM8213.G35 1906



3 2106 00163 6346

THE UNIVERSITY LIBRARY

UNIVERSITY OF CALIFORNIA, SANTA CRUZ

This book is due on the last **DATE** stamped below.

6.10.02

OCT 4 1982

